

## Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



# Amcelo

Esperanto estas lingvo,  
kiu perfekte funkcias  
laŭ konataj teorioj  
de Jakobson aŭ Halliday.

Krom neŭtrala, internacia,  
ĝi diferencas de l' aliaj  
nacilingvaj, kiuj kuntrenas  
la sangon militan pezon  
tra la gloraj historioj.

Ludoviko Zamenhof  
en la lingvo animon semis:  
la celon moralan strebe  
al unuiĝo de l' homaro.

Ne militu en Esperanto!  
For la milita pafado!  
Venku homo patrioton!

*Juiz de Fora, 15/12/2022.*

## Moissej Bronshteyn (Rusio)



Akceptu, karaj, krede aŭ malkrede:  
la Majstro mem vizitis min merkrede.

Ne gravas, ke ensonĝis la vizito,  
sed gravas ke mi estis elektito  
de l'Majstro nia, por eksperimenti—

la Dek Ordonojn novajn testamenti.

Li komisiis, ke mi vin informu  
pri tiuj, kaj trankvile poste dormu.  
Mi faras do:

1. Mi estas homo, sed ja Majstro via,  
delogu vin neniam majstr' alia —  
nek Ido feka, eĉ ne Toki Pona  
ekziston vian faros same bona.

2. La verda stel', la flag' kaj "La Espero"  
ja estu nur simboloj de l' afero,  
sed, savu Dio, tute ne fetiĉoj,  
alie trafos ni al sekto-niĉoj.

3. Ne elparolu vane mian nomon,  
por tio trovu pli modernan homon,  
se lezas vin palavra juk' malbena.  
parolu do pri Tonkin kaj Lapenna.

4. Adoru ĉiam kun anima vibro  
la helan tagon de l' Unua libro,  
sed ke l' adoro estu kontinua,  
ektostu, certe, ankaŭ je la Dua.

5. Samkiel paĉjon-panjon nur kun beno  
estimu UEA-on en mateno,  
ankaŭ Civit' aspiras al prospero —  
estimu ankaŭ tiun — en vespero.

6. Kolegojn viajn ne kritiku vane —  
kritik' maljusta murdas viamane  
kreivajn sentojn en senkulpa koro,  
ne revivigos ilin ja doktoro.

7. Se regas vin al kontraŭseks' inklino,  
vizitu UK-oj nepre sen edzino.

Senmoralulon ĉies moko punu —  
kongresedzinon trovu. Sed nur unu!

8. Ideojn fremdajn ŝtelu tre singarde,  
ja ŝtel' entute estas tikla far' de  
sterilaj uloj, senkapablaj naski  
ideon propran. Spertu tion maski.

9. Atesto falsa pri l'akuzativo —  
ag' malprudenta kaj sen perspektivo.  
Mi hontas, ke, kaptante la okazon,  
ne lasis al vi unu plian kazon.

10. Ne ekdeziru, eĉ se venas famo  
sidejon ie ekster Roterdamo,  
nek ŝanĝon de libroservist' amata,  
nek kison de la direktoro Martin.

...Vekiĝis mi, viŝante l'frunton ŝvitan,  
kaj tuj enskribis ĉion ĵus aŭditan —  
ĝin lernu — estas grava kompendio  
por viv' esperantista kaj medio,  
sed se vi tion legis kun nekredo,  
forgesu. Ja mi drinkis en merkredo.

### Ángel Arquillos (Hispanio)



## La kurierkolombo

Kurierkolombo portas  
misteran donacon blankan  
ĉe la maldekstra piedo  
per ora ŝnuro ligita.

Ŝajnas al mi ke ĝi lacas,  
ĉar la malfortaj flugiloj  
la tutan tempon glisadas  
kaj perdas l' orientiĝon.

Etaj gutetoj ekfalas  
el nigraj aĉaj nubegoj,  
sed la kurierkolombo  
ade serĉas sian celon.

Kvankam la celo tre distas  
kaj la farto de l' kolombo  
konstante pli malboniĝas,  
ĝi plu agas kun aplombo.

Por ripozi momenteton  
sur seka branĉo metiĝas  
kaj senzorge ĝi restadas  
kaj tuj poste endormiĝas.

Ĝi havas tre pezan dormon,  
dum la donaco mistera  
malligiĝas el la nodo  
kaj mistere malaperas.

La kolombo turmentata  
murmuradas kun ĉagreno  
ekflugi ĝi ne kapablas  
kaj mortas pro malespero.

### Klaus Friese (Germanio)



## Optimisma limeriko

Foriris de l' ĉielo la suno.  
Nun iras denove la luno.  
Li vidas la teron.  
Li konas la veron.  
Por li estas nubo kaj puno.

Eĉ regas dum nokto teruro.  
Ne povas ekdormi sciuro.  
Ĝi timas la tagon,  
ne ŝatas la plagon.  
Nur ĝojas avida vulturo.

Malpaco en ĉiu regiono.  
Nenie la ŝanc' por pardono.  
Ni kaŭzas ruinon.  
Ni konas destinon.  
Sufiĉus nur unu bombono.

La ĝojo por ĉiu infano.

Sed ankaŭ por bunta fazano.  
Li levas la voston,  
eldiras la toston,  
pro fino de ĉiu ĉikano.

## La masko

La maskon ne forgesu vi sur ĉiu via voj'.  
Sen masko estus tragedi', nur stres' sen iu  
ĝoj'.

En buso, trajno, en bazar' regas la kamuflaj'.  
Tute ne gravas la kolor', ĉar nigra, blanka,  
bunta ŝtof'  
ja estas nur dekor', ja pravas ankaŭ filozof'.

Tial vi spiru kun trankvil', unue vi enspiru,  
kaj poste vi elspiru, denove vi enspiru,  
trankvila, ĝusta stil'.

Baldaŭ en via dom', la masko pendas sur la  
hok',  
el kuirej' venas arom', bongustas nun la  
artiŝok'  
kun saŭco kaj bier', la fin' de la sufer'.

Sed maskon ne forgesu vi, alie morgaŭ  
tragedi'.

## Blazio Vaha (Hungario)



### Maljunula kovim-kanto

inter bordo, ponto, palaco kaj placo,  
zig-zage

Mi malŝatas kovimon,  
ekdeziris do vinon.  
Ĉu utilos nura vin'  
aŭ necesos ja kombin'?

Inon, vinon kombini  
vi proponus... Mi fini  
volus nur laboron jam,

regas min nur labor-am'.

Kovim-kant' ne konvinkos,  
kelkajn, kiuj min venkos.  
Kovimo... restu en palac'.  
Konkursoj estas... sur la plac'.

Reguloj iam validas,  
regulojn nun mi ne vidas.  
Gravas nek palac', nek plac',  
nek kovim-tim' —  
nur kor-lac'.

(8 decembro 2022)

*P.S. : La maljnulo, kiu supre kantas ne estas "precize"  
mi, kvankam certe simila al mi. — Mi fartas nun bone,  
kvankam mi cetere estis malsana, kaj mi fakte estas iom  
malforta.*

## Nia frua animo, Táncsics

Vi, bapiano Táncsics,  
estis nia koro:  
sen kono ankoraŭ  
malgraŭ nuna gloro...  
Malgraŭ nuna gloro,  
malgraŭ niaj ploroj,  
vi plu miskonatas  
malgraŭ eĉ esploroj.  
Vi, animo Táncsics...  
Tanĉiĉ-anim' nia...  
Hej, Tánĉiĉ-animoj  
frostas inter timoj.  
Hej, bapiano Tanĉiĉ  
ni vin iom festas,  
viajn fruajn pensojn  
post epok' digestas.  
Vi, bapiano Tanĉiĉ  
restas nekonata.  
Via ĉion-volo  
estas nevolata.



## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Sopiras ni, ke akompanas aŭtunon,  
 “Ŝi” forveturas por la tuta jar’,  
 La nuboj grizaj kaj ĉielo larmas,  
 Pro la folioj en lignofajr’.

Ni ne bruligu la foliojn aŭtunajn,  
 Folioj oraj— signo de la temp’,  
 Ni gardu en memoro karajn bildojn,  
 —Ĝis la revido— aŭdiĝas en la vent’.

## Wally du Temple (Kanado)



*Arbo Por Mia Hundo*

Mi trovis  
 endanĝerigitan  
 cedran arbidon  
 apud paŝita vojo  
 post kiam mia hundo Pakston mortis.  
 Per kulero mi transplantis ĝin  
 sur lian tombon.  
 Ok jarojn poste  
 la cedro fieras  
 je Kristnasko  
 kaj sidas apud mi  
 Ornamita de neĝflokaj  
 nova amiko  
 fortika pro radikoj  
 generitaj de  
 lojaleco  
 sindonemo  
 kaj svinganta  
 vosto  
 de feliĉo.

## Ĉu miaj Kokinoj Avaras?

Neniuj ovoj estis demetitaj hodiaŭ  
 Ĉu mi kritikis miajn kokinojn  
 Ĉe Solstico en Kanado

Ke ili estas avaraj  
 demeti ovojn?  
 Mi pensas, se mi estus kokino  
 kaj mia spiro videblas kiel neĝo  
 Mi ankaŭ ne elirus el mia ŝedo  
 Kaj konservus ovon aŭ du  
 Por varmigi miajn plumojn.  
 Mi pensas, ke mi estas la avidulo  
 Ĉar mi nur dekadence deziras  
 Miksi ovon aŭ du  
 kun lakto por rumtrinkaĵo  
 Ĉe Kristnasko

## Saulo Salgado Wanderley (Brazilo)

### Amteksaĵo

Ĉu ververe estas amteksaĵo  
 tio, kion vi volas meti surmonde?  
 Do, ĝin faru ankore, kiel ecaĵo  
 kies efekton ni vidos, kvazaŭ tondre!

Kuraĝe vin metu sub belan lumaĵon  
 en zorgo de alieco, lume, onde,  
 por krei vojecon, vojaĵon  
 por la progreso, enece kaj enaĵe.

Kun la Amo nur ni povas verprogresi,  
 al aferoj diaj vere interesi,  
 ĉiam plibonigante l’ inteligenton!

Rajto de vi vian menson elkaresi,  
 devo de vi vian koron elprotekti,  
 duflugile kreskiĝantu tuta gento!

*Candeia*

### Verda lenso

Mi vidas la Mondon tra Verda Lenso:  
 verdaĵo la tuton pliboniganta,  
 koloro plenplena de bona senco  
 de l’Alta Lumego de Bonkoreco!

Revu, sonĝu, karaj esperantistoj  
 pri la verdiĝo de malamikeco,  
 per sin farigi ververaj kantistoj  
 de l’Alta Lumego de Bonkoreco!

— La Pacon Verdán estigu surmonde,  
pri l' kompreniĝo parolu vibrante!  
Vi bone kaj tute konas l' aferon!

— Komencu en vi la Verdán Projekton  
tiel movante la verdán subjekton!  
Altigu la tuton, verdmanieron!

*Candeia*

## Jadranka Miric (Serbio)



### Aranea reto

Estas via forgesita peto  
kiel dense teksita aranea reto.  
Estu ni unu anima paro,  
unu koro, mia Maro.

Ekis mornaj pluvoj.  
Devojiĝis nia komuna amvoj'.  
El miaj okuloj larmoj.  
Malaperis deziro por vivĝoj'.

Vivas mi kiel hundo  
sencele vaganta  
kun granda korvundo.  
Ne plu sonĝfluganta.

### Foliumante fotoalbumon

En via mano blanka rozo  
tranvile kuŝas sur manplato.  
Sur tablo via bildo en via favorata pozo.  
Antaŭ vi staras belulin' kun nigra kato.

Brilas viaj okuloj blusafire.  
Allogas la miajn furioze mire.  
Sur via vizaĝmieno rido,  
samkiel en okuloj de via ido.

Nur mi staris apude  
kiel ino loĝanta pli sude  
ol ĉiu el via granda familio,

vestita en kostumo de serba tradicio.

### Amo

En vazo floranta rozo,  
la tuta ĉambro bonodoras..  
vi kun ĉampano en jubilea pozo  
tostas al nia amo! Ekstere suno oras!

Ligas nin longdaŭra amo  
preskaŭ kvindeko da jaroj!  
Feliĉiĝas ni kiel multaj amoparoj.  
Kune spitas al vivo kun arda flamo.

Etendita via mano  
trovis la mian,  
En alian kaŝita rozo kaj pano.  
Donaco kisa malkovris la sekreton vian.

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



### La abio brava

En la fundo de ĝardeno mia,  
vidas mi mezvintre la figuron.  
Vigle verdas foliar' abia,  
kiu donas al mi tuj plezuron.

Jam somero kaj aŭtuno foris,  
distrinte nin per abundeco.  
Pri la multkoloroj li fervoris,  
sed memfide vivas laŭ la deco.

Li etendas brakojn kiel avo,  
kun brilneĝo al infanoj ame.  
Mi sopiras ja al lia bravo,  
kiu min inspiras ĉiam flame.

La abio brava jam nun scias,  
ke printempo vintre idilias.

## Ivanichka Magharova (Bulgario)



### Spiritriĉa virino

Mi tenas en miaj manoj la lastan libron *Koro sur manplato* de Elena Popova, sed mi devas diri, ke ĝi, verŝajne, ne estas la lasta, ĉar ŝi certe jam skribas kaj preparas novan libron por eldono. En unu el ŝiaj multnombraj poezilibroj, fabeloj kaj rakontoj eldonita en kvin lingvoj — bulgara, esperanta, japana, ĉina, franca kaj unu brajle, mi legis en la recenzo de prof. d-ro Dimitrina KAMENOVA, ke Popova estas la SPIRITRIĈA virino.

Sed kiu estas Elena Popova?

Ŝia poezia vivo estas la frukto de la abunda spirita pluvo, per kiu ŝi estas donacita. Modesta, spirite riĉa, scivolema kaj malavare donanta amon kaj bonkorecon al siaj parencoj, al homoj, al infanoj, kun zorgo por la naturo. Naskita en Dobriĉ, Bulgario, Popova difinas sian naskiĝlokon jene:

“Dobruĝa, mia naskiĝloko, bela tero — verda aŭ ora, kun spiro de plugitaj kampoj aŭ matura greno... Ĉu ĝi estas seka aŭ malseka, ĉu ĝi nin punas aŭ rekompencas, ĝi estas kiel patrino — ni ne povas koleri al ĝi, sed nur esti dankemaj, ami ĝin.

Ĝi donis al mi panon kaj belecon, devenon kaj memsenton pri aparteno. Mi povas nur diri kun sinklino: Estu ĉiam paco!”

Jes, Popova restas eterne ligita kun tiu ĉi bela Dobruĝa regiono.

Ŝi studis en la Ekonomia Universitato en urbo Varna. Ĝuste tie, kiel studentino, ŝi komencis lerni Esperanton. Ŝia gvidanto estis doc. Georgi Dimov. Poste ŝi partoprenis kurson por instrukapablo de Esperanto kun kursgvidanto doc. Kunĉo Valev.

Poste ŝi partoprenis kurson por instrukapablo de Esperanto kun kursgvidanto doc. Kunĉo Valev.

Reveninte al Dobriĉ, ŝi estis elektita prezidanto de la Esperanto-societo “Paco”.

Unuaj poeziaj provoj. Kvankam Popova asertas, ke ŝi ne estas poetino, ŝia unua libro, kiu estis eldonita de Eldonejo Pres-Esperanto, Sofio, Bulgario, estis “Silento en la arbaro”, malgranda poemaro. Sekvis la publikigo de la nova: “Maltrankvila animo”, kiu estas verkita en la bulgara kaj la franca, tradukita de la prezidantino de la Eldonejo. La titolo de la libro plene respondas al la maltrankvila animo de Elena. Ŝia mensa sinteno puŝas ŝin al novaj kaj novaj poeziaj

altecoj.

Ŝi verkis kaj eldonis dek kvin librojn, i.a. naŭ ili infanlibrojn bulgarlingve en Esperanto kaj ĉina.

En 2000-a jaro ŝi iĝis kunfondinto de la Lokhistoriista societo en Dobriĉ. Popova esploris kaj verkis historion de la Esperanto-movado en Dobriĉ. Ŝi verkis ankaŭ eseolibron pri siaj bulgaraj Esperanto-amikoj.

Aperis ankaŭ ŝiaj kvar libroj kun hajkoj en esperanto, bulgarlingve kaj parto de ili en japana.

Kaj jen kion skribas la redaktoro, bedaŭrinde nun forpasinta, Venelin Mitev, pri la hajkaro “Koro sur manplato”, en esperanto kaj bulgarlingve: “La nova libro de Elena Popova lastafoje pruvas, ke la talento ne havas aĝon. Kaj ke oni ne povas esti poeto, se oni ne havas talenton — la poeto naskiĝas kun tiu ĉi dia donaco...Ŝia hajko-poezio estas kreita kun eksterordinara ŝparemo kaj juna freŝeco de la esprimrimedoj, kaj samtempe ĝi estas profunda kaj multaspekta, ĉar ĉe ĉiu nova legado ni trovas novan asociecan subtekston.”

Pri la lasta poemaro “Stelaj sugestoj”, 2022, aperas tre karesema recenzo de Georgi Mihalkov. Multe da ŝiaj hajkoj, rakontetoj, intervjuoj aperis en la esperantaj revuoj: Bulgara Esperantisto, Esperantista tribuno, Razgrad, Bulgario, Literatura foiro, Svislando-Organon de PEN centro de Esperanta Civito, Turka stelo, Penseo, Ĉinio, La Lampiro, Brazilo.

Se mi devus difini la kronon de ŝiaj vivo kaj talento, mi sendube montrus la libron “Esperanto—ponto al Amikeco”. Libro, frukto de amikecoj, faritaj tra la jaroj dank’ al la lingvo Esperanto. De Japanio ĝis Brazilo, de Eŭropo ĝis Azio, la lingvo Esperanto malfermas pordojn, malfermas korojn al bono, al amikeco kaj kunlaboro, al homara socio sur la Tero, kion ni bezonas hodiaŭ. La potenco kaj ebleco de la internacia lingvo Esperanto estas kaj estos ponto por bonfaroj.



Popova estas membro de UEA kaj Honora membro de Bulgara Esperanto-Asocio.

La vivo de Elena Popova estas dediĉita kun amo al la homoj, al la infanoj, al la bono, kaj la lumo en nia animo.

*Razgrad, Bulgario*

## Pablo Milanés

### Mi ja ne petas

Per blua stelo  
el ĉielo ne regalu min.  
Mi nur deziras  
vian lumon ĉirkaŭ mi sen lim’.  
Mi ja ne petas  
ke, por ami, vi subskribu dek paperojn, ne!  
Mi nur deziras  
ke ni ĝuu miajn karajn birdojn dum promen’.  
La pasintaĵojn ja ne forneos mi;  
estontaĵoj alvenos laŭ kutim’.  
Kaj en la nuno, jen mi fajfas pri homoj  
kiuj ĉiam klaĉos pli.  
Plenigu nepre  
ĉiun minuton per motivoj por spiradi plu.  
Min ne komplezu,  
ne babilu, ne rifuzu nun.  
Per blua stelo  
el ĉielo ne regalu min.  
Mi nur deziras  
vian lumon ĉirkaŭ mi sen lim’.

*Tradukis*



**Liven Dek (Hispanio)**

## El Ĉina Antikva Poezio

Xin Qiji (1140-1207)

### Nokto de Lanterna Jesto

#### —laŭ melodio *Verjada taso*

Tra nokto l’ orienta vent’ florigas arbojn,  
kaj blovflirtigas stelojn en pluveska falo.  
Sur vojo plenas luksaj ĉaroj kaj kaleŝoj  
jen ellasantaj bonodoron de nektaro.  
Muzik’ de flutoj vibras en aero,  
lanternoj lumas en blindiga palo,  
abrobataĵoj kaj ĵogladoj sin prezentas  
ĝis la maten’ en luma klaro.

Virinoj kun orbrilaj kapornamĵoj  
disiris babilante kun rideto,  
postlasis parfumeton sur la vojo.  
Mi serĉis ŝin mil fojojn kun diskreto,  
sed mi nenie ja ŝin trovis.  
Subite mi min turnis kun kapĵeto,  
kaj mi jam vidis, ke en maldensej’ de lumo  
ŝi staras atendante kun koketo.

#### —laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Mi volus, ke mi povas fuĝi el ĉagreno  
sur l’ alta turo, sed kune kun mi  
ascendas turon mia spleno.  
Jen kelkaj lokoj aliiĝas jam en fizionomi’  
kaj multe da karuloj kaj amikoj, ve, en ĝeno  
senilas ja kun blankiĝinta kapo pro anksi’.

Ne plu foriru, tiuj, kiuj restas tie ĉi,  
ignoru tiujn, kiuj jam foriris sen reveno.  
Ne ĉiuj havas korinklinon al rangpromoci’  
nek emon gajni feŭdon jen kun peno.  
Enoficiĝo aŭ ermitiĝ’ ne estas garanti’,  
dum pli liberas esti nubo sen kateno.

#### —laŭ melodio *Subigo de ŝtormo*

Aŭskultu al mi kanti en ebrio  
la kanton pri disiĝ’ mizera.  
Disiĝo dum la vivo igas nin senhelpaj.  
Se regas inter ni la sento vera,  
mil lioj ŝajnas al ni la vojpec’ nelonga;  
sed se ekzistas inter ni la sento nefidela,  
sidante vid-al-vide, ni nin sentas  
apartigataj kvazaŭ de distanc’ ĉiela.

Mi diru al la river' de l' Ŝtona Urbo:  
sen oficrango en palaco imperia,  
mi eĉ ne timas ŝtormon en hommondo,  
eĉ se ni ne kapablas kiel par' cikonia  
ja flugi ĝoje sur ĉielo blua.  
Kaj nun mi kutimiĝas, jam sen penso  
iluzia,  
al hokfiŝado kiel la fiŝisto olda,  
vestante sin per pajla pluvmantelo sia.

*Elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**

\*\*\*\*\*

Zhu Shuzhen (ĉ. 1135—ĉ. 1180)

## La pejzaĝo je ekrigardo

La kvietan fenestrframon milde  
Ombros la bambuoj en zefiro.  
Ĉiuj paroj da someraj birdoj  
Streĉe ĉirpas ĉe la sunsubiro.  
Kiam velkas spektakilaj floroj  
Kaj salikaj florkvastoj forflugas,  
Tagoj nun longiĝas, kaj vetero  
Somnolemon al homoj kondukas.

## Falantaj floroj

Floroj sur interplektitaj branĉoj pompas,  
ilin draŝas ĵaluzemaj pluvofaloj.  
La Printempa Dio regu do konstante,  
kaj ne punktu verdan muskon per petaloj.

**alia versio**

## La floroj falantaj

Sur amligitaj branĉoj floroj sin prezentas,  
Enviaj vent' kaj pluvo ilin tuj turmentas.  
Mi volas, ke l' Printempo reĝu por eterne;  
Sur verdan muskon ne falu l' petaloj sterne.

Xu Ji (1162 - 1214)

## En friska mateno

Rizkampo akvoplana estas vasta kaj ebena,  
tra arbojn en krepuska nebulo la suno brilas.  
Ankaŭ al oriojoj plaĉas frisko frumatena,  
kaj ili en verdmonta ombro gajhumore trilas.

*Elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**

\*\*\*\*\*



## Zhuangzi

ĈAPITRO TRIDEK UNUA

## La maljuna fiŝisto

§31-01

Kiam Konfuceo promenis en densa arbaro nomata “Nigra Tendo”, li sidis kun siaj disĉiploj por ripozo sur la teramaso Abrikota Teraso. Liaj disĉiploj legis librojn, dume li kantis kaj ludis la liuton. Kiam li ludis ĝis la duono de la muziko, iu maljuna fiŝisto kun blanka barbo, blankaj brovoj kaj longaj pendantaj haroj, eliris el sia boato. Li paŝis laŭlonge de la riverbordo svingante siajn grandajn manikojn kaj, alveninte al iu loko alta kaj ebena, haltis kaj eksidis tie por aŭskulti la muzikon kaj la kanton, kun sia maldekstra mano metita sur la genuo kaj sia dekstra mano apoganta sian mentonon. Kiam la muziko venis al halto, li geste alvokis la du disĉiplojn de Konfuceo, Zigong kaj Zilu, ke ili alvenu al li.

Montrante en la direkto al Konfuceo, la fiŝisto demandis:

“Kio li estas?”

“Li estas noblulo el la regno Lu,” respondis Zilu.

“Kia estas lia familia nomo?” demandis la fiŝisto.

“Kong,” respondis la disĉiplo.

“Je kio li sin okupas?” la fiŝisto plu demandis.

Antaŭ ol Zilu respondus, la alia disĉiplo, Zigong, intermetis:

“Nia majstro sin tenas je la fideleco kaj la sincereco. Li praktikas la humanecon kaj la justecon,



modifas la ritojn kaj la muzikaĵojn kaj reguligas la homajn interrilatojn. Li estas lojala al la reganto; li instruas kaj edifas la popolon, por alporti bonon al la mondo. Jen tio, je kio li sin okupas.”

Post momento la fiŝisto demandis:

“Ĉu li estas princo kun teritorio?”

“Ne,” diris Zigong.

“Ĉu li estas ministro helpanta al iu princo?” daŭrigis la fiŝisto.

“Ne,” respondis Zigong.

La maljuna fiŝisto ekridis kaj sin returnis dirante:

“Povas esti, ke li estas humana, sed mi timas, ke li mem ne povos esti libera de malfeliĉoj. La torturo mensa kaj fizika, kiun li trudis al si, endanĝerigas sian propran naturan dispozicion. Ho ve! li ja estas tro fore de la vera Taŭo.”

Zigong revenis kaj raportis al Konfuceo tiujn parolojn. Forŝovinte de si la liuton, Konfuceo stariĝis kaj diris:

“La maljuna fiŝisto devas esti saĝulo.”

Poste Konfuceo malsupreniris de la teraso kaj paŝis al la rivero por serĉi la fiŝiston, kiu tiumomente estis preta remi for de la bordo. Ĉe la vido de Konfuceo, la fiŝisto haltis kaj sin turnis al li. Konfuceo retroiris kelkajn paŝojn, faris riverencon kaj alproksimiĝis al la fiŝisto.

“Kion vi deziras, ke mi faru por vi?” demandis la fiŝisto.

“Ĝus vi foriris lasante viajn parolojn nefinitaj,” respondis Konfuceo. “Mi ne estas sufiĉe inteligenta ilin kompreni, kaj mi permesas al mi atendi kun la espero, ke mi povos persone interparoli kun vi, por ricevi instruojn el viaj paroloj.”

“Ho, kiel studema vi estas!” ekkriis la fiŝisto.

Konfuceo ree riverencis kaj diris:

“Mi estas lernema ekde mia infanaĝo. Nun mi estas en la aĝo de sesdek naŭ jaroj, sed mi neniam ricevis la perfektajn instruojn pri la vero. Kiel mi kuraĝus ne esti humila por aŭskulti viajn instruojn?”

“Laŭ la principoj de la naturo,” diris la fiŝisto, “ariĝas estaĵoj de la sama speco, kaj harmonias sonoj de la sama frekvenco. Permesu al mi klarigi kion mi scias, ĉar tio povos esti utila por tio, kion vi faras. Vi vin okupas pri la homaj aferoj. Se la kvar klasoj de la

homoj — la reĝo, la princoj, la regnoficistoj kaj la simplaj popolanoj — okupas ĉiu sian propran pozicion, la socio estos en perfekta ordo; alie, ĥaoso kaj malordo estos neeviteblaj. Se la regnoficistoj plenumas ĉiu sian devon kaj la popolanoj zorgas ĉiu pri siaj aferoj, tiam malaperos ĉiaj malordoj kaj ĝenoj.

“La kampoj lasitaj en nekulturiteco, la domoj lasitaj en kadukeco, la nesufiĉeco de vestoj kaj nutraĵoj, la tropezaj impostoj, la kvereloj inter la edzinoj kaj la kromedzinoj, kaj la manko de hierarkio inter la pliaĝuloj kaj la plijunuloj — jen ĉio, pri kio la simpla popolo maltrankviliĝas.

“Ne esti sufiĉe kvalifikita por sia ofico, ne esti kompetenta plenumi sian funkcion, la misuzo de sia povo, la neglekto de siaj subuloj, la manko de meritoj kaj prestiĝo, kaj la perdo de siaj titolo kaj salajro — jen ĉio, pri kio la grandaj oficistoj maltrankviliĝas.

“La manko de fidelaj ministroj en la kortego, la konfuziĝo de la ĉefurbo kaj la regno, la malboniĝo de la metioj kaj artoj, la neperfekteco de la tributitaj objektoj, la malobservo de la ordo en la kortega aŭdienco, kaj malplaĉo al la reĝo — jen ĉio, pri kio la princoj kaj dukoj maltrankviliĝas.

“La malharmonio de la jino kaj la jango, kiu kaŭzas la nenormalan ŝanĝiĝon de la kvar sezonoj, kiuj difektas la kreskadon de ĉiuj vivaj estaĵoj en la mondo, la ribeloj de la princoj kaj dukoj, kiuj kuntrenas batalojn inter diversaj regnoj kaj mortigojn de la popolanoj, la malmodereco de la ritoj kaj la muziko, la elĉerpiĝo de la financoj, la ĥaosa ordo de la homaj interrilatoj, kaj la spitado al la leĝoj fare de la simpla popolo — jen ĉio, pri kio la reĝo maltrankviliĝas.

“Nun vi posedas la aŭtoritatecon nek de princo aŭ duko, nek de ministro, sed vi arogas al vi modifi la normojn de la ritoj kaj la muziko kaj starigi la ordon de la homaj interrilatoj kun la celo instrui kaj gvidi la regatojn. Ĉu vi ne pensas, ke vi ja enmiksas vin en tion, kio tute ne koncernas vin?”

“Cetere, ekzistas ok malvirtoj, kiuj koncernas la homojn, kaj kvar malbonoj, kiuj koncernas la aferojn. Oni devas sin gardi kontraŭ ili.

“Enmiksiĝi en alies aferon estas arogo; doni konsilojn al homoj malgraŭ ties ignorado estas elokventemo; paroli humile por sin konformigi al aliaj

estas flato; paroli sen elekti inter la vera kaj la malvera por plaĉi al aliaj estas flataĉo; paroli malice pri aliaj estas kalumnio; semi malkonkordon kaj provoki malpacon estas agitado; laŭdi malsincere kaj mallaŭdi mensoge estas malico; fari nenian distingon inter bono kaj malbono, peni akiri favorojn de ambaŭ flankoj kaj senskrupule ĉasi personajn profitojn en sekreta maniero estas danĝera insideco. Tiuj, kiuj havas tiujn ĉi ok malvirtojn, faras malutilon kiel al aliaj, tiel ankaŭ al si mem. Tial la virtuloj ne kamaradiĝas kun ili kaj la saĝaj reĝoj neniel volas fari ilin ministroj.

“La kvar malbonoj estas ambicio, avido, obstineco kaj malhumileco. La ambicio estas ami sin okupi je grandaj aferoj kaj laŭvole ŝanĝi la normojn kun la intenco akiri al si renomon per sukceso; avido estas kalkuli je sia eta klereco en farado de arbitraj decidoj kaj alkroĉiĝi al sia obstina memfido; la obstineco estas vidi siajn erarojn sen ilin korekti, aŭdi kritikajn admonojn kaj tamen fari ankoraŭ pli da malbono; la malhumileco estas akcepti nur tion, kion li mem aprobas kaj rifuzi ĉion, kion li ne aprobas. Nur tiuj, kiuj forĵetas tiujn ĉi ok malvirtojn kaj senigas sin je tiuj ĉi kvar malbonoj, povas esti instruataj.”

*Elĉinigris*



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

## Ĉineske

**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**

### Karuloj

— laŭ ĉinesko *Kanto de lavantino*\*

Karuloj  
oldaj jen  
ascendis jam al Eden’.  
Spiritoj restas tere,  
ĉiam vartas nin kun ben’.

\* *Kanto de lavation* (ine: *Daolianzi*): ĉina fiksfirma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,

a, xa (x=senrima)

## NOSTALGIO

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu*\*

La oraj jaroj floris,  
sed tamen foris.  
En sonĝo aperos vi,  
amare dolĉas la nostalgi’.

La brizo vigle blovas,  
veramon trovas.  
Eterne vi vivu jen  
kaj vartu nin ame kun la ben’!

\**Belulino Yu* (ĉine: *Yumeiren*) ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

## Oraj jaroj

— laŭ ĉinesko *Mallongigita melodio magnolia*

Tiam floris,  
la oraj jaroj foris.  
Aperas vi  
en sonĝo kun nostalgi’.

Brizo blovas  
kaj veran amon trovas.  
Vi vivu jen  
kaj vartu nin kun la ben’.

\**Mallongigita melodio magnolia* (ĉine: *Jianzi Mulanhua*): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

## Pasio

— laŭ ĉinesko *budhista dancisto*\*

Fru-amo ja sinceras,  
kisado tre teneras.  
Dolĉas flustr’ sen fin’,  
kun kora inklin’.

Vivo ja pluos,  
jaroj tuj fluos.  
Kiel fartos vi

kun ajna pasi' ?



\*Budhista dancisto (ĉine: Pusaman): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

## Jadranka Miric (Serbio)

### Atendante neĝon

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Decembra  
la varmeta tag',  
surprizis ĉiujn. Rido  
sur vizaĝoj. Ek al lag'  
Bela reago!.

Ĉirkaŭaj'  
je malfrua aŭtun'  
tre bonodoras. Mildas  
radioj. Salut e sun',  
kaj de mi al Lun'.

Belulin',  
kies kovrita  
nigra harar' kontraŭ vent'  
estis jam protektita,  
maŝe ligita

Ludanta  
Suno en ĉi lag'  
spegliĝas. La paro  
ĝue albordiĝas. Tag'  
kiel flirta flag'.



\**Sopir-al-sudo* (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma

poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo  
xa,xa,a (x=senrima).

## Gajo (Ĉinio)



### La montrozoj en mia hejmloko

Mia naskiĝvilaĝo kuŝas apud valetoj inter montetoj. En nia regiono, la grundo estas tiel magra ke ĉiuj verdaĵoj kreskas ne tre prospere.

En la valetoj klara rojeto elfluas el natura fonto. Somere la rojakvo tre malvarmas kaj vintre tamen varmetas kun grizblanka fumnebulo ŝvebanta supren. La rojo serpentas malsupren laŭlonge de la valetoj, kaj laŭlonge de la rojo zigzagas vojo pavimita per simplaj ŝtonplatoj. Vidiĝas super la rojo kelkaj simplaj pontetoj el grandaj ŝtonblokoj. La akvo en la rojo estas preskaŭ travidebla, en kiu libere kaj vigle ludnaĝas diversspecaj fiŝetoj kaj salikokoj, kiujn mi plejofte ĝue spektadis dum mia infanca tempo.



Ambaŭflanke de la valetoj staras montetoj ĉenece ligite unu kun la alia, sur kiuj kreskas diversspecaj arboj, arbustoj, dornoj, bambuetoj kaj lianoj, ankaŭ iom da fruktaroj. Krome, tie ankoraŭ kreskas arbusto dornohava, interalie sovaĝa rozo, kiu min impresis tre profunde kaj neforgeseble. Tia planto alinomiĝas montrozo, ĉar je folioj, tigoj kaj parfumetaj floroj ĝi iom similas al la urbaj kortaj rozoj kaj havas fortegan vivipovon. En printempo ili pompas ĉie, ĉu sur montoj, ĉu apud vojoj sen homaj kulturado kaj flegado. Milda printempa venteto disportas la delikatan aromon kaj preterirantoj pretervole enspiras la bonodoron por sin refreŝigi kaj agrabligi.

Apud la zigzaga montvojo al mia hejmo, ĝuste proksime de la domo kreskis kelkaj grandaj tufoj da sovaĝaj floroj, kiuj ĝis nun ankoraŭ aperas en mia memoro.

Florsezone, ĉiufoje kiam mi pasis preter la floroj, mi haltis longan minuton por kisi la florojn per

rigardo, enspiris la bonodoron en printempa dolĉeta freŝa aero, aŭskultis zumkantojn de abeloj, kiuj jen flugas jen haltas por kolekti la florpolekon kaj por okulsekvadi dancadon de papilioj belaj kaj diverskoloraj, kiuj celas ankaŭ mielon...Kiel favoras la naturo! Kiel belas la printempo! Kiel ĉarmas la sovaĝaj rozoj! Tiutempe mi ofte ebriiĝas de tiuj sovaĝaj floroj kaj forgesas eĉ la malsaton kaj lacon pro spektado de tiuj laboremaj insektoj! Kun ĝojo nevertigebla kaj feliĉeto neesprimebla mi sentas la tiaman vivon eĉ feliĉa, la mondon florplena. Antaŭ mi la ĉevojaj montroj kune kun aliaj sennombraj floroj kvazaŭ ĉarme ridetas, la rojeto kvazaŭ kantetas, ĉirkaŭe la montaro kvazaŭ dancadas,...kaj tiam mi svage sentas, ke la sovaĝaj rozoj ĉe la pado al mia hejmo ne nur estas agrablaj sovaĝaj floroj, sed ankaŭ amikoj kaj kunuloj por mi dum tiu nutromanka tempaĝo!

Poste, kiam mi lernis en la kvara gimnazio de nia gubernio, mi ankoraŭ ofte memoris kaj sopiris pri la sovaĝaj rozotufoj proksime de mia hejmo. Mia lernejo sidis pli ol dudek liojn for de la hejmo, tial mi devis loĝi en lernejo. Proksimume ĉiumonate mi hejmeniris nur unu fojon. La hejmeniro kutime okazis en sabata posttagmezo. Sen vespermanĝi mi rapidis al hejmo por atingi antaŭ ol oni ŝaltis la lampon.

En serenaj tagoj de printempo mi iradis grandpaŝe al la hejmo kaj bonhumore ĝuadis la belajn pejzaĝojn laŭlonge de la tuta vojo. Kelkfoje mi eĉ zumis kantetojn dum piedirado. Kvankam ankoraŭ malproksime de la hejmvilaĝo, mense mi ŝajnis vidi la rojeton vigle lirlanta, la montetojn verdiĝantaj kaj la montrozojn, precipe tiujn ĉe la vojeto al mia hejmo, okulplaĉe pompantaj. Irante kaj bildigante ĉi ĉion, mi tute perdis la sentojn de malsato kaj laco. En mi ĝojo kaj ekscitiĝo ekbolis ke mi baldaŭ min ĵetos en la varman sinon de la hejmvilaĝo! Tiuhore, miaj kruroj ekportis min mem antaŭen pli kaj pli rapide. Ĉio de la hejmvilaĝo ĉiam min ravas, kuraĝigas, intimigas kaj altiras.

Irante, mi ekflaris la de mi konatan mildan bonodoron de montroj apud la vojo. Kiam mi vidis la tegmenton el pajloj, mia koro batis pli rapide kaj mi ekĝojis, ke mi tuj atingos la hejmon, ekaŭdos la

intimajn vokojn de la amplenaj gepatroj kaj baldaŭ min satigos per bongustaj manĝaĵoj kuiritaj de mia bonkora patrino. Ho, patrino, mia kara patrino! Sed ve! Nun ŝi dormas entombe sur la monta deklivo jam de kelkdek jaroj! Nun nur la pompantaj montroj ŝin akompanas!

En la jam pasinta malfacila kaj nutromanka tempo, sur la vojo de la lernejo al mia hejmo mi ofte estis tiel terure malsata, ke mi eĉ povus engluti tutan ĉevalon! Tamen nun, kiel estas bone, ke mia solfilo povas manĝi kion ajn kaj kiom ajn laŭ sia propra volo!

Ĉiuprinteme, kiam la milda kaj dolĉa venteto kun aromo de la floroj kaj herboj tra la fenestro envenas kaj karesas mian vizaĝon, mi kvazaŭ refoje ekflarus la korpenetran ravan bonodoron de la sovaĝaj rozoj kiuj enradikiĝas en la malfekunda grundo de mia hejmloko.

Pasis pli ol kvindek jaroj kaj miaj gepatroj jam delonge forpasis. Ni fratoj ĉiuj forlasis la hejmlokon kaj nun vivas kaj laboras aliloke. Kvankam la dometo en nia hejmloko jam longe ruiniĝis pro manko de loĝado kaj flegado, tamen la sovaĝaj rozoj de mia hejmloko ankoraŭ pompas en mia koro!

En alia urbo mi ofte sonĝas pri mia naskiĝloko—mia radiko, kaj ankaŭ la tieaj montroj, kiuj donis al mi multe da ĝojo, revo kaj kuraĝeco en mia infanaĝo.

Nun denove printempas. La milda bonodoro de diversaj floroj sendata al mi per la printempa venteto faras ke en mia cerbo nebulece bildas mia naskiĝvilaĝo kun sovaĝaj rozoj florantaj pli ĉarme kaj pli prospere, kaj, pro ilia ornamado la klara rojeto kaj verdaj montetoj fariĝas belaj pli kaj pli sub la printempa sunbrilo!



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

[www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm)

